WIKIPEDIA

Kornvala lingvo

La **kornvala lingvo** (kornvale *Kernowek*) estas kelta lingvo de la britona branĉo, tre proksima al la bretona lingvo. (La bretonoj de Francio estis kornvalanoj, kiuj transiris la maron en la 6-a jarcento.)

Kornvala lingvo

Kernewek, Kernowek



Mapo de la historia malkresko de la rando de la malnova kornvala lingvo.

Parolata en	Britio
Parolantoj	600
Skribo	Latina alfabeto

Lingvistika klasifiko

Hindeŭropa

Kelta

Britona

Kornvala

Oficiala statuso

Reguligita de	Keskowethyans an Taves Kernewek
Lingva statuso	5 krize endanĝerigita

Lingvaj kodoj

Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	kw
ISO 639-2	cor
ISO 639-3	cor
Glottolog	corn1251
Angla nomo	Cornish
Franca nomo	cornique

Vikipedio

Enhavo

Historio
Kornvala kaj Esperanto
Bibliografio
Vidu ankaŭ
Referencoj
Eksteraj ligiloj

Historio

Oni kutimis aserti, ke la lasta flua parolanto de la kornvala estis iu virino, nome Dolly Pentreath, kiu mortis en 1777, sed tio ne plu estas kredebla. Estas diversaj raportoj, ke ankoraŭ en 1875 troviĝis kelkaj parolantoj, kaj eĉ en 1906. La laste menciita estis virino nome Alison Tregenning, sed dum ŝia vivo la revigligo de la lingvo jam progresis. Resume, ŝajnas, ke la lingvo neniam estis tute forgesita. La revivigo komenciĝis en la 19-a jarcento precipe per la klopodoj de du elstaraj gvidantoj: Henry Jenner kaj Robert Morton Nance. En la fruaj jaroj de la 20-a jarcento, Jenner eldonis lernolibron kun la titolo A Handbook of the Cornish Language (Manlibro de la kornvala lingvo). Sekvis lernolibro verkita de Nance: *Cornish for All* (Kornvala por ĉiuj) (1929), kaj *Lessons in Spoken Cornish* (Lecionoj en parola kornvala) de A. S. D. Smith (1931). La rezulto de tiuj klopodoj estis estiĝo de tiel nomata *Unuigita kornvala*. Kelkaj opiniis, ke tiu formo de la lingvo estas tro rigida kaj arkaika, do kreiĝis iom reformita formo nomita *Moderna kornvala*.

En 1986 la plimulto de la kornvalaj asocioj kaj instancoj adoptis normigitan formon, kiun oni nomis Komuna kornvala. Ĉar ĉiuj tiuj formoj temas pri la skriba lingvo, tiuj diferencoj tute ne malhelpas komunikon inter parolantoj de la kornvala. La plimulto de la parolantoj devenas de la pli aĝa generacio, sed

la lingvo nun estas instruata al infanoj en kelkaj unuagradaj kaj duagradaj lernejoj. En la printempo de 2008, oni taksis, ke 2000 homoj flue parolas la kornvalan, kaj kelkaj personoj sub la aĝo de 30 jaroj estas edukataj kiel denaskaj parolantoj. Oni neniam povus supozi, ke la plimulto de la loĝantoj en Kornvalo iam parolos la kornvalan anstataŭ, aŭ kune kun, la angla, sed unu el la plej gravaj britaj lingvistoj, nome David Crystal, opinias, ke restos malgranda, sed influhava minoritata komunumo, kiu konservos la lingvon.

La 5-an de novembro 2002 la brita registaro agnoskis la kornvalan kiel unu el la lingvoj inkludindaj laŭ parto 2 de la Eŭropa Ĉarto pri Regionaj kaj Malplimultaj Lingvoj, kaj deklaris, ke ĝi intencas registri ĉi tiun decidon ĉe la Konsilio de Eŭropo.

Kornvala kaj Esperanto

Kimura Goro Christoph partoprenis en kolektiva verko *La arto labori kune* per artikolo *La kornvala kaj Esperanto: entreprenoj similaj*.[1] En ĝi li prezentas la kornvalan lingvon kiel minoritata kaj disa en sia regiono same kiel Esperanto, kun kiu ĝi havas aliajn similaĵojn. Dekomence oni devas agnoski la karakteron de la kornvala kiel planlingvo por revivigo de iama lingvo, ne kiel la hebrea, ĉar ĝi ĝuis prestiĝon kaj komunikan bezonon, kio mankas al la kornvala, kiu nur en la 21-a jarcento sukcesis havi oficialan agnoskon. Simile (ne same) kiel ĉe Esperanto, ankaŭ la kornvala kreis "regionan lingvon sen denaskulara kerno", kaj tio pere de "kursoj, kluboj, kunvenoj kaj seminarioj"; tiele aperis originala literaturo kaj organizo por familio, nun same kiel ĉe Esperanto. Oni indikas kvar komunajn trajtojn por ambaŭ lingvoj: volontuleco, ne-etneco (multaj lernantoj de la kornvala ne estas kornval-devenaj), ne-teritorieco (ĉar la kornvala estas disa en apartaj lokoj) kaj interna ideo, anstataŭ "ekonomia aŭ profesia neceso", sed por la kornvala konsistas en liberigo de la regiono "de la nuntempa marĝeneco".[2] Aliaj hazardaj similaĵoj estas la kreiva aliro al la lingvo kaj la kontribuo de iu Tonkin, nome Thomas Tonkin (1678-1742), estante Humphrey Tonkin mem kornvaldevena. Pro ĉio tio la aŭtoro proponas ke Esperanto lernu el la kornvala fari sociologiajn kaj lingvokapablajn studojn, dum la kornvala lernu el Esperanto fronti la skismojn.

Bibliografio

- Geoffrey Sutton, *Konciza Historio pri la Kornvala Lingvo kaj ĝia Literaturo*, 1969

Vidu ankaŭ

- Lingvistiko
- Listo de lingvoj
- Gorsedh Kernow

Referencoj

1. ↑ *La arto labori kune – Festlibro por Humphrey Tonkin*, Roterdamo, 2010, UEA (ISBN 978-92-9017-113-3). paĝoj 171-177.
2. ↑ Kimura Goro Christoph, La kornvala kaj Esperanto: entreprenoj similaj en La arto labori kune: festlibro por Humphrey Tonkin, paĝoj 171-177.

Eksteraj ligiloj

- Vikipedio en la kornvala (https://kw.wikipedia.org/wiki/Main_Page)
- Kornvala lingva asocio (http://www.magakernow.org.uk/)

- *Monato*, internacia magazino sendependa, numero 1998/01, paĝo 23: La kornvala (https://www.esperanto.be/fel/mon/005792.html) verkita de Edmund Grimley Evans.
- esperante Britujo: Scilly-insularo estas eta paradizo (https://uea.org/vikio/Britujo:_Scilly-insularo_estas_eta_paradizo) en **retgazeto** Nia Mondo (https://uea.org/vikio/niamondo)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Kornvala_lingvo&oldid=6652853"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 13:29, 24 jun. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.